# LA INFORMILO

Bulteno de la Orient-franca Federacio aliĝinta al Unuiĝo Franca por Esperanto

Prezidanto : R. KUBLER - 20, Rue du Ruisseau - RODEREN - 68 - THANN (Ht-Rhin)

Sekretario : J.-P. COLNOT - 15, Rue de Lavaux - 54 - LAXOU (Mthe et-Moselle)

Kasisto : J. CHAPELLIER - 43, Rue Palissot - 54 - NANCY - CCP 399-75 NANCY

N° 54 - JANUARO 1967

F E L I Ĉ A N N O V J A R O N

kaj B O N A N S A N O N por 1 9 6 7 !

deziras al vi la Komitato de la Orientfranca Federacio kaj la redakcio de la Informilo.

## ĈE LA NOVA JARO

La vorto de la Prezidanto

Multaj personoj, kiujn mi renkontas, miras pro la fakto, ke Esperanto ne antaŭenpaŝas pli rapide. Kiam mi parolas pri nia Federacio, tiuj personoj ankoraŭfoje miras pro la malgranda nombro de federacianoj.

Kaj bedaŭrinde, ni devas konstati, ke ni estas malmultaj, kaj **seme** ke nia membraro konsistas ofte el neaktivuloj.

Ĉiu scias tamen, ke Esperanto bezonas de ĉiu el ni la fortojn. Tro facile estas nur pagi sian jarkotizon kaj poste, nenion farante, neniel agante, fidi je la klopodoj de kelkaj aktivuloj.

Kia ĝojo, eĉ estante malpli nombraj, se ni povus diri ke ĉiu el ni dediĉas iom el sia libera tempo por Esperanto.

Tiam niaj klopodoj estus rapide fruktodonaj, antaŭ nelonge kreskus la aro de kotizpagantoj, kies ĉiu estus samtempe aktivulo.

Kiu malpermesus al ni revi en tiu periodo, kiam naskiĝas la nova jaro ? Post kelkaj monatoj, la tagoj fariĝos denove pli belaj...

Baldaŭ estos reveninta la tempo de la kongresoj, de la renkontiĝoj. Jam de nun ni povas aŭdi pri skiferioj en apudaj landoj.

Ĉu vi partoprenos almenaŭ unu el tiuj aranĝoj ? Ĉu vi kaptos la okazon fariĝi plenrajta membro de nia universala familio ? Ĉu alie ni ne riskus forpuŝi el niaj koroj kaj el niaj mensoj la veran signifon de du belaj vortoj : amo kaj amikeco...

R. KUBLER.

# RAPORTO pri la 25a KONGRESO

de la Orientfranca Esperanto-Federacio

okazinta en Sélestat la 15 an de Majo 1966

Belega vetero favoris nian kongrestagon, kaj verŝajne la gaja suno kune kun la allogeco de ĉarma alzaca urbeto incitis niajn samideanojn ĉeesti pli multnombraj ol kutime : ĉirkaŭ 50personoj plenigis la kongressalonon ĉe la unua etaĝo de "Brasserie Schutzenberger". Nur 25 el ili estis membroj kaj posedis la rajton voĉdoni ; krome 6 aliaj membroj, kiuj ne povis veni, transdonis sian voĉon al ĉeestantoj. Esprimiĝis do 31 voĉoj (el 84 membroj).

**MALFERMO :**

La kongreson malfermas nia juna Prezidanto Roland KUBLER, kaj tuj poste li transdonas la parolvicon al sia homonimulo, Dro KUBLER, urbestro de Sélestat, kiu per kelkaj afablaj vortoj bonvenigas nin en sia urbo, kaj akcentas ke ni laboru por ke 1967 estu brila 80a datreveno de la apero de la unua broŝuro de Dro ESPERANTO, kaj samtempe la 50a datreveno de la morto de la Majstro. Vigla aplaŭdo dankas la urbestron kaj gratulas lin pro lia bona dokumentiĝo pri la historio de nia lingvo !

S-ro CUENE, organizanto de la kongreso, legas kelkajn senkulpigajn kaj salutajn leterojn de neĉeestantoj ; li speciale bonvenigas S-ron HEISS kaj plurajn gesamideanojn el la najbara germana urbeto Oberkirch. Ni notu ankaŭ la ĉeeston de S-ro HUG el Lunéville, veterano de nia movado, kiu konatiĝis kun Dro ZAMENHOF jam ĉe la unua Universala Kongreso, en Bulonjo ĉe Maro (1905).

La sekretario legas la aktivecan raporton de la Federacio (aperinta en la lasta Informilo n° 53) kaj komentas ĝin. Oni poste ekzamenas la raporton de la kasisto, S-ro CHAPELLIER, kiu pro la sekvoj de sia akcidento ne povas ĉeesti la kongreson.

Ambaŭ raportoj estas unuanime akceptitaj de la ĉeestantoj.

Pluraj aktivuloj aldonas al la ĝenerala aktiveca raporto precizigojn pri sia loka agado : S-ro KNECHT, S-rino MULLER por Strasburgo, S-roj KUBLER kaj GROSSMANN por Thann, S-ro CLAUDEL por Bruyères (ĉeestas entute 9 personoj el Thann kaj 8 el Bruyères, ĉiuj gejunuloj, kiuj speciale "rejunigas" la atmosferon de ĉi-tiu kongreso kompare kun la antaŭaj !), S-ro DURAND pri sia kurso en Epinal.

Kaj nun ni renovigas trionon de nia komitato : el la 4 eksiĝantoj komitatanoj, nur S-ro CHAPELLIER denove kandidatiĝas, S-ro BERGEROT petas F-inon JACQUOT (ambaŭ en Epinal) anstataŭi lin. La 2 aliajn komitatanojn anstataŭas S-ro CLAUDEL (Bruyères) kaj S-ro HABERMEHL (Strasbourg). Neniu alia kandidato anoncas sin, la 4 kandidatoj estas unuanime elektitaj.

La kongreso poste ekzamenas la raportojn de la Nacia Unuiĝo. Ni aprobas la agadraporton de U.F.E.

Sed la kontraporto tuj vekas longajn diskutojn, en kiuj partoprenas la ĉefaj aktivuloj. Dum 1964 kaj 1965 nia kongreso esprimis (ĝentilajn) rezoluciojn, petantajn ke la financa raporto de U.F.E. estu klare redaktita por esti komprenata de ĉiu, sed ĝis nun ŝajne oni ne atentis tiujn rezoluciojn (1). Tial daŭras de pluraj jaroj cirkulera kampanjo, kies ĉefa fonto de argumentoj estas ja la malklareco de la kontoj de U.F.E., kiu permesas ĉiajn deduktojn. Tia kampanjo estas tre bedaŭrinda, ĉar ĝi endanĝerigas la tutan movadon. S-ro LIENHARDT rimarkigas, ke jam lastjare esprimiĝis dum nia federacia kongreso la deziro ekkontakti la respondeculojn de la aliaj federacioj, por ke ĉiuj federacioj kune povu agi demokratece, prezentante al la Nacia Unuiĝo komunajn rezoluciojn, kaj samtempe por ke la federacioj povu devigi U.F.E. atenti tiujn dezirojn.

.../...

(1) Pli poste la kontrevizinto, S-ro Pierre ROYER, prezentis ĉe la Nacia Kongreso tre detalan raporton, kiu ŝajne klarigis la situacion, sed la federaciaj kongresoj ne povis studi tiun dokumenton.

Sed ni ne konas la aktivulojn de la aliaj federacioj. Nur kun la Centra-Okcidenta ni havis kontakton pere de S-ro BOYET.

Ni devas ankaŭ dum nia kongreso elekti trionon de la konsilianoj de U.F.E. Sed la nombro de la kandidatoj estas egala al la nombro de liberaj postenoj, tial ne povas esti elekto. Per levitaj manoj, ĉiuj kandidatoj estas do elektitaj de nia federacia kongreso.

Ankaŭ montriĝas, ke neniu membro de nia Federacio povos ĉeesti la Nacian Kongreson en Agen.

Tial nia kongreso :

- komisias la sekretarion enketi pri la adresoj de la respondeculoj de la diversaj federacioj por eventuala estonta komuna agado.
- komisias lin peti S-ron BOYET, kiu estos delegito en Agen de la Centra-Okcidenta Federacio, ke li ankaŭ reprezentu la Orientan. Se li ne akceptus, ni perletere turnus nin rekte al la Nacia Kongreso en Agen. (2)
- komisias nian delegiton : - transdoni la rezultojn de la baloto de nia Federacio,
  - aprobi la agadraporton de U.F.E.
  - prezenti la jenan rezolucion pri la kontraporto :

"Ni malaprobas la prezentadon de la kontraporto, ĉar oni ne sufiĉe klare komprenas ĝin, kaj ni deziras, ke estonte la konttenado estu reorganizita laŭ antaŭa projekto menciita en la protokoloj aperintaj en "Franca Esperantisto" n° 229a, paĝon 84an, kaj n° 233a, paĝon 54an. La kontoj estu prezentataj al la membraro kiel vera bilanco kun la necesaj klarigoj, kaj ne kiel simpla kassituacio".

  - prezenti la jenan rezolucion pri la elekto de la konsilianoj :

"La nombro de la liberaj postenoj estas egala al la nombro de la kandidatoj, tiel ne povas esti elekto. Tamen oni ne devas kulpigi pri tio la konsilion de U.F.E., sed nur konsili al la opoziciantoj ke ili estonte ankaŭ prezentu kandidatojn, kun programo."

Pli poste, ni aprobas alian rezolucion de S-ro LIENHARDT kaj proponas ĝin al la nacia kongreso :

"La Orient-franca Federacio rekomendas pli larĝan uzon de frapaj aktualaj varbtekstoj (sloganoj), uzeblaj en gazet-artikoloj, kiel anoncojn sur varbiloj, poŝtkartoj, afiŝoj, glu-markoj, kaj simile.

Kiel ekzemplon, ĝi proponas la jenan tekston :

Si tous les jeunes du monde commençaient aujourd'hui - avec l'aide des éducateurs favorablement disposés - à se familiariser avec les règles très simples de la langue universelle Espéranto, ils seraient capables d'ici un an de se comprendre mutuellement sans difficulté, en tous lieux et en toutes circonstances.

D'ores et déjà l'expérience est lancée et se poursuit avec succès dans près de six cents écoles de vingt-huit pays.

Vous aussi, vous pouvez participer à cette expérience intéressante et au mouvement mondial militant en faveur d'une meilleure compréhension réciproque entre les ressortissants de toutes les nations ! Demandez de plus amples renseignements à ..."

S-ro COURTOIS, sekretario de JEFO, kiu venis speciale el Parizo, deziras kontakton kun la junuloj de nia Federacio. (Plurfoje dum la debatoj, li prezentis la vidpunkton de la konsilio de U.F.E.).

.../...

(2) S-ro BOYET akceptis kaj efektive reprezentis nin.

S-ro COLNOT prezentas, por la kreo de Federacia Informservo, proponon de cirkulero, kiu je la nomo de nia Federacio petos la gazetojn regionajn enpresi komunikojn pri Esperanto (pli multajn, se eble !). Stariĝas reto de departementaj respondeculoj en la 6 departementoj alzacaj kaj lorenaj. Krome ni rilatas kun respondeculoj en Franche-Comté, ĉar pere de la gazeto "Est Républicain" ni havas eblecon aperigi komunikojn ankaŭ en tiu provinco. La liston de ĉiuj respondeculoj ni aperigos en la venonta Informilo.

*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*

La ĉi-supre resumita raporto verŝajne ne donas ideon pri la longeco de la debatoj. Ni devis interrompi ilin iom antaŭ tagmezo, ĉar oni atendis nin por vizito de la fama "humanista biblioteko" (ne "humurista" kiel raportis - cetere sen ia humuro ! - iu loka gazeto !!). Tiu vizito estis speciale aranĝita por nia kongreso je la peto de S-ro CUENE, kaj tiu aranĝo estis verŝajne por multaj la plej interesa punkto de la programo (kvankam la tre lerta komentario de la gvidisto ne estis esperantlingva !). Ni povis admiri multajn treege malnovajn manuskriptojn kune kun la unuaj konataj presitaj libroj.

Post la tagmanĝo, kiu estis tre gaja kaj riĉa je personaj kontaktoj, la plej multaj partoprenantoj deziris kompreneble kanti kaj distriĝi. Bedaŭrinde la debatoj ne estis finitaj kaj pro la baldaŭa foriro de diversaj aktivuloj, ni devis tuj daŭrigi ilin. Nur tiam la rezolucioj estis finredaktitaj. Rapida komitata kunveno daŭrigis senŝanĝe la ĝis nunan estrar... ĉar estis neniu alia kandidato.

Estis tiam tempo por foriri, kaj la antaŭviditaj distraĵoj ne povis okazi. Ni zorgu ĉiuj kune por ke la venonta kongreso "ne dronu en babila protokolumado, kio estas ja kutima plago de niaj ordinaraj kunvenoj federaciaj..." skribis prave iu komitatano (kiu ne povis ĉeesti !). Kaj por apogi ĉi tiun (lastan!) rezolucion, ni aŭdigas ĉi-sube la voĉon de la junuloj...

J.-P. COLNOT.

*****************************************************************************************

POSTKONGRESAJ IMPRESOJ DE JUNULOJ...

En Majo, ni veturis al la regiona kongreso en Sélestat. La vetero estis varma kaj ni estis ĝojaj, ni rakontis historiojn kaj amuziĝis dum la tuta vojaĝo, kiu bone pasis malgraŭ la malbonaj vojoj.

En la loko de la kongreso, kelkaj sinjoroj akceptis nin. Poste ni trinkis kafon, manĝis kukpanon kaj ni komencis aŭskulti kaj paroli la internacian lingvon. Poste ni supreniris al la kongresĉambro. Tie, estis junaj kaj maljunaj personoj, kiuj sidis ĉirkaŭ tri tabloj. La prezidanto kaj pluraj sinjoroj parolis pri la movado, sed ili parolis tro rapide kaj ni ne bone komprenis tion, kion ili legis ĉar ni ne havis la foliojn kie la paroladoj estis skribitaj. Tiuj paroladoj, interesaj por la esperantistoj kiuj konas la lingvon de pluraj jaroj, ne estis tiaj por ni, la novuloj, ĉar ni ne sufiĉe konis la lingvon, ni ne komprenis ilin kaj ni enuis dum du aŭ tri horoj.

Dum la manĝo, la junuloj ne estis kune, la grupo de Thann ne manĝis ĉirkaŭ la sama tablo kie troviĝis la grupo de Bruyères. Ni provis paroli kaj kanti sed ni nur parolis inter ni, la junuloj de Bruyères, kaj kiam ni kantis, neniu kantis kun ni.

Du el ni preparis teatraĵeton pri la profesoroj de nia liceo sed la samideanoj foriris antaŭ ol ili povis ludi ĝin.

Poste, oni promenis en la urbo kaj revenis en Bruyères. Ni pli ridis, kantis kaj parolis en la aŭtoj ol dum la kongreso.

.../...

Poste, ni finis la tagon per bona manĝo en la restoracio "Al la koko de Bruyères". Ni multe parolis, rakontis historiojn kaj ridegis ĉar troviĝis pluraj personoj kaj profesoroj de nia liceo en tiu restoracio. Ni estis tre feliĉaj ĉar oni ludis la teatraĵeton, parolis pri niaj profesoroj kaj ili aŭskultis sed ne komprenis.

Ni pensas ke la organizantoj de kongresoj devus prepari aŭ preparigi ludojn por la junuloj dum la paroladoj pri la movado, tial, la regionaj kongresoj, kiuj por multaj el ni, estas nun la sola okazo por vojaĝi per Esperanto, pli kuraĝigus nin por daŭrigi la studadon de la lingvo.

Verkis : Liliane DAVID (Bruyères).

****************************************************************************************************

## COTISATIONS 1967

| | Membres âgés de : plus de 21 ans | moins de 21 ans |
|---|---|---|
| 1. Membre Etudiant ou Jeune . . . . . . . . . . . . | - | 2,50 F. |
| 2. Membre adhérent de U.F.E. et U.E.A. . . . . . . . (1 et 2 reçoivent le bulletin trimestriel d'informations en français). | 5,- F. | - |
| 3. Membre "Junior" (jusqu'à 21 ans) . . . . . . . . . . (reçoit "Franca Esperantisto") | - | 8,- F. |
| 4. Membre titulaire . . . . . . . . . . . . . . . . (reçoit"Franca Esperantisto") | 20,- F. | - |
| 5. Membre individuel de U.E.A. (M.J.) . . . . . . . . . (comme ci-dessus, reçoit en plus l'Annuaire avec adresses des délégués et des organisations espérantistes). | 37,50 F. | 17,- F. |
| 6. Membre individuel de U.E.A. (M.A.) . . . . . . . . . (reçoit en plus la revue Esperanto). | 55,- F. | 35,- F. |

Tous les membres reçoivent la carte de U.E.A. et les coupons donnant droit aux services des délégués.

Dès réception de votre cotisation vous recevrez la Membrokarton de U.E.A. pour les nouveaux adhérents et la Membromarkfolion 1967 dont la vignette (imprimée dans le bas) est à découper et à coller dans le cadre réservé de la Membrokarto.

Les cotisations sont à adresser au C.C.P. du Trésorier Fédéral en ajoutant 1 F. pour l'abonnement à la INFORMILO :

J. CHAPELLIER 43, Rue Palissot 54 - NANCY
C.C.P. 399-75 NANCY.

Sauf pour les membres du Groupe de Strasbourg, qui sont priés de vouloir bien payer à leur trésorière :

Mme J. OEHRI 24, Rue des Sarcelles 67 - STRASBOURG NEUHOF
C.C.P. 306-58 STRASBOURG

en y ajoutant la cotisation du groupe dont le montant est de 5 F.

NIA VIVO EN ...

... BRUYERES (Vosges).- Ni unue raportos pri la esperanto-vivo en tiu urbeto, ĉar ĝi estas la unua laŭ alfabeta ordo, ĉar ĝia raporto estas la unua alveninta por presigo en la Informilo, kaj ĉar ĝi montras ankaŭ la aktivecon la plej viglan :

Ek de la pasinta jaro, S-ro Jean-Louis CLAUDEL, juna profesoro pri fiziko en la liceo de Bruyères, ekinstruis Esperanton al 35 liceanoj ; 24 restis fidelaj kaj sukcesis ĉe la unuagrada ekzameno. Kvar el ili veturis kun S-ro CLAUDEL al Grésillon dum la Paskoj ferioj, kaj 6 al Sélestat.

Nun, S-ro CLAUDEL gvidas diversajn kursojn - kurson por 10 profesoroj de la liceo - unuagradan kurson por 12 novaj gejunuloj - duagradan kurson por 12 pasintjaraj lernantoj.

Krome kelkaj el la "malnovuloj" instruas al 9 aliaj gejunuloj (al kiuj S-ro CLAUDEL pro horaro-malfacilaĵoj, ne povas mem instrui).

Ĉiu menciita kurso okazas ĉiu semajne kaj daŭras unu horon.

Varmajn gratulojn al la Bruyères-anoj !

... STRASBOURG.- La Strasburga grupo nombras pli ol dudek membroj, sed nur la duono el ili partoprenis tiun jaron al la vivo de la Esperantista Amikaro de Strasburgo.

Ĉiun merkredon okazis kunveno (krom dum somera libertempo), ĉu en la "Maison des Tanneurs" kie trinkante glason aŭ tason ni babiladas amike ; ĉu rue de la Croix, kie en rezervita ĉambro ni povas pli taŭge priprensi nian esperantan vivon. Tie, ni ekzemple diskutas (kaj disputas) pri gramatika vidpunkto, pri aktuala evento, kiel regiona aŭ universala kongreso. Tie ankaŭ ni projekcias filmojn aŭ diapozitivojn pri la ĵus pasintaj libertempoj aŭ pri la lasta kongreso ktp. Tiele la grupo trapasas la vintron.

- Dum februaro, S-ino OEHRI k. S-ro CUENE parolis al ni pri Maroko k. projekciis belajn diapozitivojn el tiu lando.
- 16/23an de Marto. La grupo pripensas la organizon de la proksima regiona kongreson ; elektas novan grupan prezidanton, S-ro KNECHT, ĉar la iama, S-ro CUENE forlasis Strasburgon, konstatas ke la grupa kaso bone statas.
- 15an de Majo. Federacia Kongreso en Sélestat preparita precipe de S-ro CUENE, kiun ni tutkore kaj publike gratulas.
- Kvin gestrasburganoj partoprenas la 51an U-Kongreson en Budapest. La viroj veturis per U.F.E.-aŭtobuso kaj la virinoj per internacia trajno, sed ĉiu pasis memorindajn tagojn eksterlande kaj en Budapest, kiu fariĝis esperanta urbo dum semajno.
- 21an de Septembro, Unua kunveno de la grupo por la jaro Budapest/Tel-Aviv. Ni preparas la akcepton de S-ro LAURAT el Parizo, iama profesoro en Strasburgo, kiu vizitos nin morgaŭ.
- 22an de Septembro. Rue de la Croix ni akceptas S-ron LAURAT. Li devas prelegi en Germanujo, kaj trapasante la regionon li haltis en Mulhouse k. Strasbourg, kie li promesis paroli pri neologismoj.
  Verdire, li tute simple diris ke neologismoj... tute ne estas bezonataj por flue k. agrable paroli esperanton. Kaj por ilustri tiun aserton, li legis kelkajn poemojn siajn kaj diris plurajn ŝercojn, ĉu siajn ĉu de Raymond SCHWARTZ. Ĉio estis dirita per bela voĉo k. ĝusta tono sed tute sen neologismoj. Finfine agrabla kunveno ; dankon al S-ro LAURAT.

.../...

- Okt./Nov. Dum tri kunvenoj ni vidis el Hungario okaze de la U-Kongreso bildojn pere de filmoj, diapozitivoj k. poŝtkartoj projekciitaj, dank'al S-inoj OEHRI, GRAMPP, MULLER kaj S-roj HABERMEHL k. ZIPFEL.
- La 14an de Decembro okaze de la Zamenhof-a tago, ni rememoros per taŭgaj legadoj la vivon de la Majstro. Aliaj bildoj el Budapest okaze de la jam 51a U-Kongreso, honoros la memortagon.

La Kursoj - Kiel li faris pasintjare, nia sindona samideano ZIPFEL gvidas kurson de 12 gelernantoj, ĉe la C.C.P.-Poŝtoficejo.

Ankaŭ du perkorespondaj kursoj daŭre funkcias.

Malfeliĉe S-ro HABERMEHL ne daŭrigos tiun jaron sian kurson en Lycée Technique, kie li profesoris ĉar li jam estas emeritulo.

Niaj projektoj por la venonta jaro :

- Januaro 67 : S-ino OEHRI, nia senlaca vojaĝantino, prelegos pri Israël, lando de la 52a U-K. en 1967. La prelegon, du serioj de diapozitivoj animos, nome : "Ridanta Galileo" kaj "De Jerusalem al Negevo".

- Printempo 67 : Ni provos organizi ekskurson en la apuda montaro "Vosges". Eble tiam ni invitos ĉiujn samideanojn N-orientajn en amika renkontiĝo antaŭ labora renkontiĝo en Mulhouse okaze de nia regiona kongreso.
- Ĉar en la ĵurnalo "Esperanto" kelkaj aŭtoroj atentigas la esperantistojn pri gravaj problemoj aktualaj, ni decidis studi (de tempo al tempo) aparte tian artikolon kaj diskuti pri ĝi dum unu/du kunvenoj. Tia komuna laboro profitos al ĉiuj, ni kredas.

F. KNECHT.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

AL LA EKSKURSO-AMATOROJ

La programo 1966a tre malbone efektiviĝis : krom la Federacia Kongreso, ekskurso al Pierre Percée estis anoncita por la 19/6, en kazo de bela vetero. Fakte, la vetero ne estis tre bela, tial neniu venis el Strasbourg, Bruyères, ktp... Sed deko da nancianoj, jam dise foririntaj la sabaton kaj tranoktintaj en diversaj lokoj en la regiono - Celles - Raon l'Etape - retroviĝis ĉe la rendevuejo la dimanĉon, subgaja suno ! Bedaŭrinde pluvo tamen akompanis nin poste dum parto de la ekskurso.

Poste, pro privata troa okupiteco mi ne povis prizorgi aliajn ekskursojn kajnenio okazis !

Sed jam por 1967, la grupo de Strasbourg anoncas sian intencon ekskursi kaj renkonti samideanojn. La thann'anoj deziras renkonti ĉefe la Bruyères-anojn. Do verŝajne io efektiviĝos.

Do, ĉiuj interesatoj atentu bone : Unue, nur la personoj, kiuj anoncis sian intereson por ekskursoj estas avertataj (letere) kiam la dato de ekskurso preciziĝis. Do, anoncu vian intereson se vi volas averton.

Due, mi bonvolas peradi la diversajn proponojn kaj dezirojn pri ekskursoj, sed estas ne normale ke ĉiuj atendu ĉiam ke la iniciatoj venu de mi! - Se mi ne havas tempon oerbumi , nenio okazas! Tio devas ŝanĝiĝi. Mi atendas do viajn proponojn pri datoj, lokoj, ktp... Indiku ĉu vi preferas aŭtomobili, aŭ piediri (iomete, aŭ ... 20 kilometrojn?) Indiku ankaŭ en kiu(j) regiono(j) vi preferas aŭ povas ekskursi.

J.-P. COLNOT
15, Rue de Lavaux à LAXOU (54)

* * * *

En venonta Informilo, ni publikigos liston de interesatoj en diversaj urboj. Tiel ĉiu aktivulo, kiu iniciatos ekskurson, povos rekte averti la ĉefajn interesatojn en sia regiono.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

KORESPONDA KURSO de la NANCIA JUNULDOMO

Al ĉiuj kurskunlaborantoj : Por troa okupiteco mi ne povis rilati persone kun multaj el vi jam de longa tempo. La kurso tamen ĉiam funkcias.

Mi kalkulas kun la kunlaboremo de S-roj VIRY (Malzéville), DENIS (Bar-le-Duc), OFFROY (Château-Salins), COLLIN (Nancy), F-inoj COLIN (Lunéville), JACQUOT (Epinal), S-roj KUBLER (Roderen), BERGEROT (Epinal), BRESSON (Ailloncourt), GROSSMANN (Vieux Thann).

Ili bonvolu eventuale informi min pri siaj intencoj, kaj sendi raporton pri la laboro de siaj lernantoj. Laù ricevitaj (...aù ne ricevitaj) raportoj, el 13 lernantoj al kiuj ni liveris dum la 2 pasintaj jaroj la novan kurson, neniu finis ĝin ; la plej multaj forlasis la lernadon post 1 aù 2 lecionoj. Same, la dissendo de la fleksebla disko (nur 12 ekz.) montris katastrofan rezulton : nur 2 personoj poste aliĝis al la kurso... kaj forlasis ĝin. Mi ŝatus do havi vian propran opinion pri la oportuneco daùrig la laboron per la kurslibro aù repreni nian antaùan 22-folian kurson.

Mi memorigas al vi, ke nia varbado (18 lernantoj dum la lernjaro 1964-65 - 7 dum 1965-66) sekvas la aperigon de komunikoj en la gazetaro. (En 1964-65 : 141 dissenditaj aperis certe 32, informpetoj 57 - En 1965-66 : 78 dissenditaj, aperis certe 17, informpetoj 21.).

J.-P. COLNOT.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

NOVA TURISMA PROSPEKTO

Nova kvarlingva ilustrita faldprospekto ĵus aperis pri la departemento "Haute-Saône" kun esperanta teksto. Ĝi estas senpage ricevebla ĉe "Iniciata Sindikato"- 70 - GRAY. Vi povas ankaù mendi la interesan prospekton pri GRAY kun esperanta eldonaĵo.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

DEZIRAS KORESPONDI :

S-ro JOSEF JAKUBIAK - SULECHÓW - 14, KVIATOVA 5 - VOJ. ZIELONAGÓRA (Pollando)
(78-jara vidvo, deziras korespondi por plibone lerni Esperanton)

S-ino ELIZABETA FEKECS - BUDAPEST - II CSALOGÁNY u. 3/B III - 4 (Hungarujo)
(60-jara vidvino, deziras proks. samaĝan francan korespondantinon)

S-ro BOLLOBÁS JÓZSEF - MISKOLC III - TOKAI FERENC U.74 (Hungarujo)
(14-jara junulo, deziras interŝanĝi belajn bildkartojn kaj poŝtmarkojn)

F-ino SZABÓ TERÉZ - MISKOLC II - AVASALJA UTCA 5 (Hungarujo)
(22-jara junulino - bildkartojn kaj poŝtmarkojn, kun 24-28 jara junulo).

FENYVESI JENÖNÉ - NYÁRLÖRINC I.46 - KECSKEMET (Hungario) - deziras korespondi.

BENKÖ Emilia - VÁRPALOTA - Górdonyi Géza u.26 (Hungario) 15-jara knabino, gimnazianino en (1-a klaso.

KÁVAI Magdalena - HÓDMEZÖVÁSÁRHELY - Szoboszlai u.5 (Hungario) 17-jara studentino.

GÖCS Edit - HÓDMEZÖVÁSÁRHELY - Mahài országùt, 11 (Hungario) 17-jara studentino.

# KIO OKAZAS EN THANN?

Post longa vegetado la junulara grupo en Thann serĉas denove sian revigliĝon.

Antaŭ Pasko, dum tiu-ĉi jaro estiĝis nova kurso kiun sekvis 3 novaj kaj 3 malnovaj gelernantoj. Sed ilia ĉeestado fariĝis pli kaj pli malofta; ankaŭ la diferenco de la studnivelo de la lernantaro malhelpis al la plena sukceso de tiu kurso.

Sed malgraŭ tiu malsukceso, nia grupo sentis en si-mem ke ĝi ne devas forlasi sian antaŭan sukceson kaj malesperi. Post la ferioj ni denove regule kunvenadis, almenaŭ unufoje po monato. Nia grupo nun nombras 8 membrojn. Kelkaj el ili jam bone scipovas la lingvon, tamen estas areto da gevegetemuloj, kiuj certe kaj utile bezonus reencerbigi kelkaln esperantajn konojn por eviti ke ili restu "eternaj komencantoj" kaj ankaŭ por permesi al la grupo plifortigi sin per viglaj anoj. Do, niaj kunvenoj fariĝu pli allogaj, eĉ pli amuzaj sed ankaŭ pli instruaj.

Sed niaj grupanoj ankaŭ vojaĝis iomete por ĉeesti kelkajn renkontiĝojn kaj kongresojn. Je la komenco de julio, 4 ekvojaĝis per aŭto al Oberkirch en Germanujo, kie ni estis afable akceptitaj kvankam ni tute ne antaŭ anoncis nin. Tre agrabla estis la dancvespero en la gastejo "Obere Linde". Proksime de la urbo, ni trovis taŭgan lokon por tendumi, ĉar ni kunportis tendon, preferinte tiun pli ekonomian tranoktadon, kaj fakte ni dormis bone. Eĉ unu el ni preferis dormi sub ĉielo. Pro la mallumo li elektis erare lokon kun urtikoj.... sed tamen plej longe dormis. (ĉu ne, Roger ?).

Dimanĉon ni kunvenis kaj Samideano POPPECK pri rakontis al ni la historion, la agadojn, la sukcesojn de la oberkirch-a grupo. Ni tre interese kaj iomete avide aŭskultis ĉion.

Antaŭ kelkaj semajnoj, tri el nia grupo kuraĝis vojaĝi al Parizo okaze de la fervojista jarkunveno. Foririnte vendredon vespere, ni estis afable akceptitaj en la Orienta Stacidomo en Parizo de tri ĉarmaj junaj samideaninoj.

Sabaton ni estis tre afable gastigitaj de samideanino Andrée MASSARD, kiun ni sincere dankas. Posttagmeze ni ŝipveturadis sur Sejno kaj vizitis la kelon de la Eifel-turo, kie ni gustumis tre bonan vinon; ni ankaŭ longe promenadis tra Parizo.

Post la vespermanĝo okazis la amuza vespero kiu bone distris nin; ĝi estis prezentita de la pariza grupo en ejo fervojista domo. La nokta pariza promenado kondukis nin al kafejo en Montmartre. Ni pasigis agrablajn horojn. Roland estis la pli saĝa kaj post tio iris dormi, dum ni daŭrigis ĝis la fama restoracio " Porka piedo " kies ne malpli faman cepo-supon ni certe ne forgesos. Post tiu laciga kaj sendorma nokto, ni tamen ĉeestis (iomet dormemaj) la jarkunvenon....

Finante ni esperas ke nia grupo havos pli trafajn sukcesojn en sia estonta agado!

A.GROSSMANN

LASTMINUTAJ INFORMOJ.

El Thann atingas nin la informo de revekiĝo de Esperanto en GUEBWILLER ( je 30 Km. de Thann), kie s-ro WERMELINGER komencis novan kurson kun 22 gelernantoj post tre efika propagando per paneloj ekspoziciitaj en montrofenestroj de magazenoj.

=*=*=*=*=*=*=*=*=*=*=

ESPERANTISTO ĉiam devas porti VERDAN STELON ! Ĉu vi portas ĝin, videble ?

Se vi ne havas Verdan Stelon, mendu ekzempleron al la federacia kasisto :

CHAPELLIER Jean - 43,rue Palissot - 54 - NANCY - C.C.P. 399-75 Nancy

Haveblaj :

1.- Verda stelo, diametro 6mm.kun pinglo 5cm.longa sendkosto enkalkulita. . . Fr.1,60
2.- - d° - -d°- 9mm. -d°- 4cm.longa - d° - . . . Fr.1,50
3.- - d° - 12mm.granda, ĉu kun pinglo, ĉu por butontruo, -d°- . . . Fr.1,50

=o=o=o=o=o=o=

Ĵus ricevita poŝtkarto de 16 jaraĝa hungara lernantino kiu deziras korespondi kun samaĝaj gelernantoj; skribu al la jena adreso :

NÉMETH Ida - Markotaböd̈öge - Fö ùt.30 - GYÖR-SOPRON MEGYE (Hungarujo)

Sekve al la decidoj de nia Federacia Kongreso, ni publikigas la liston de la :

FEDERACIAJ RESPONDECULOJ EN FRANCUJO

| | |
|---|---|
| NORD. | : S-ro ODENT Georges - 17,rue des Bouvreuils<br>62 - ARRAS |
| CENTRE-OUEST-ANGERS<br>(Bretagne- Normandie) | : S-ro FRANGEUL André - 42,rue du Pré Pigeon<br>49 - ANGERS |
| PARIS.<br>(Région parisienne) | : S-ro GUILLAUME Jean,prezidanto, ĉe U.F.E. 34,rue de Chabrol<br>: S-ro ROUSSEAU Jack, kasisto -d°- 75-PARIS(X) |
| EST. | : S-ro COLNOT Jean-Paul, sekretario, 15,rue Lavaux - 54 - LAXOU<br>: S-ro CHAPELLIER Jean, kasisto, 43,rue Palissot - 54 - NANCY |
| BOURGOGNE. | : S-ro CUGNY Pierre - 14,rue A.Brullé - 21 - DIJON |
| PROVENCE. | : S-ro JULLIEN Marcel, La Lagramuso - Avenue Plantier<br>13 - AIX-en-PROVENCE |
| MASSIF CENTRAL. | : Fr-ino HUETTER Carlita - 12,rue des Jacobins<br>63 - CLERMONT-FERRAND |
| SUD-OUEST. | :S-ro BABIN Pierre - Lycée Pierre Loti,<br>17 - ROCHEFORT-SUR-MER |
| TOULOUSE-PYRENEES | : S-ro CRISTOFOL Tony - 24,rue du Coin de Lamoure<br>31 - TOULOUSE |
| LANGUEDOC-ROUSSILLON | : S-ro LLECH-WALTER - 5,Quai Vauban - 66 - PERPIGNAN |
| RHONE-ALPES. | : S-ro LEMAIRE René - 3,rue Dr.Rebatel - 69 - LYON (5e) |

-=O=-=O=-=O=-=O=-
-O-=-O-=-O-
-O=O-
O